

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA  
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : PRAHA-VII, SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.— ; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto : Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-  
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

### **Dánská vláda se chápe esperanta.**

Velký film o Dánsku, jenž byl natočen z příkazu kodaňské vlády pro zahraniční propaĝandu, byl opatřen esperantskými tituly. Neutrální a snadno srozumitelný text umožní, že film pronikne do všech zemí. Brzy bude promítán také v Československu.

### **Indové informují esperantem Evropu.**

V severních zemích evropských konají již po několik měsíců propaĝační cestu Ind Lakshmiswar Sinha, aby informoval veřejnost o svém národě a o posledních událostech v Indii. Lakshmiswar Sinha přednáší esperantsky a jeho výklady jsou navštěvovány hromadně obecně. Cestoval dosud po celém Švédsku a dostal se až do Kiruny za polárním kruhem. Má za sebou též cestu Norskem a nyní se odebral na přednáškové turné do Estonska.

### **Esperanto k zvýšení cizineckého ruchu.**

Esperantský světový svaz má ve významnějších místech všech zemí své čestné zástupce, kteří jsou k dispozici zahraničním členům. Tím bylo umožněno nyní utvoření organizace, která systematicky využívá daných možností. Pořádá velké výpravy, které mají postaráno o ochotné a inteligentní průvodce všude kam přijedou. První pokus, jenž se potkal s naprostým úspěchem, byl učiněn letos mezi Švédskem a Estonskem. Esperantský turistický výbor najal celé parníky a dopravil tak několik tisíc návštěvníků na stockholmskou výstavu a do jiných míst švéd-

ských. Kancelář výboru ve Stockholmu vypravila opět výlety do Estonska. Na výměnu mezi Švédskem a Estonskem odešlo též několik dětských výprav, jejichž členové se naučili rychle snadnému esperantu. V příští sezoně hodlá jmenovaná organizace rozšířit svou činnost na uspořádání cest i do jiných zemí, jmenovitě do střední Evropy.

### **České dílko přeloženo pomocí esperanta do litevštiny.**

Výbor pro svatováclavské oslavy vydal esperantskou brožuru o svatém Václavu, o níž se jevil takový zájem, že musil být vydán nový náklad. V Kovnu přeložili esperantský text a vydali tam tuto knížku v litevštině.

### **Zamenhofova ulice ve Varšavě.**

Varšavská ulice Dzika, kde působil doktor Zamenhof, autor esperanta, byla přejmenována městskou radou na ulici Zamenhofovu. V Československu máme již dvě ulice, nesoucí jméno Zamenhofovo: v Bratislavě a v Nových Zámčích.

### **XXII. světový kongres esperantský**

se konal v Oxfordu za účasti 1200 osob z 30 zemí. Protektorát převzali vévoda z Connaughtu a ministr zahraničních věcí Henderson. Četné státy vyslaly své delegáty, též Mezinárodní úřad práce. Kongresová jednání se konala v oxfordské radnici. Na letní universitě esperantské zároveň uspořádané přednášelo několik učenců různých národů.

**PENSOJ DE MARKO AURELO.**

Trad. P. E. Stojan.

## II.\*

VII-61. La arto de la vivado pli similas al lukto ol al danco, ĉar necesas ĉiam sin gardi kontraŭ la batoj kiuj subite falas sur nin. VII-69 La morala perfekteco konsistas en tio ke oni pasas ĉiun tagon tiel, kvazaŭ ĝi estus la lasta, kaj oni evitas ekscitiĝon, rigidecon, falsajon. VII-33 Gajnu sen fiero, perdu sen korŝiro. VIII-50 Maldolĉa kukumo? — forĵetu ĝin. Pikarbustoj sur la vojo? — ĉirkaŭiru ilin. Tio sufiĉas. Ne demandu do: kial tiaj aĵoj ekzistas en la mondo? VIII-55 Generale la malvirto ne malutilas al la mondo. En aparta kazo ĝi malutilas nur al tiu kiu ĝin havas. VIII-58 La homo kiu timas la morton, timas: aŭ ke li nenion plu sentos, aŭ ke li sentos alimaniere. Sed, se la sento ne plu ekzistos, li ne plu suferos, kaj se la sento estos alia, li estos alispeca estaĵo, kiu ne ĉesos vivi. IX-3 Ne malestimu la morton, sed bonakceptu ĝin, ĉar ĝi estas la parto de la aĵoj intence faritaj de la naturo. Kiaj estas la juneco, la maljuneco, la kresko, la matureco, la dent-apero, la barb-apero, la harblankiĝo, la fruktiĝo, la gravedo, la infanasko, ... tia estas ankaŭ la diseriĝo de cia korpo. Kaj sammaniere kiel ci atendas la tagon kiam elventriĝos la infano kiun portas cia edzino, same bone ci devas renkonti la horon en kiu cia animo forfluigos el sia ĉirkaŭkovrilo. IX-29 La Universa Vivo estas torento kiu fortrenas ĉion. Kiom do estas etaĉaj tiuj pigmeoj kiuj ludas je la politiko kaj kiuj pretendas aĝi filozofe... malgrandaj muknazuloj. XI-10 Neniam la naturo malsuperas antaŭ la artoj, ĉar la artoj estas nur la imito de la naturo. XI-13 Iu min malestimas. Tio estas lia afero. La mia konsistas en tio ke oni ne trovu min maldiligenta aŭ riproĉinda. Iu min malamas. Tio estas lia afero. Sed mi konservos ĉiam mian bonvolon, bonkorecon al li... XI-27 La pitagoranoj rekomendis levi la okulojn ĉiumatene por rememorigi al si pri tiuj estaĵoj kiuj plenumas eterne sian taskon — ne flankiĝante, ne ŝanĝante sian disciplinon kaj purecon, ... pri la astroj.

\* Vidu La Progreso XI. p. 66.

Dr. STAN. KAMARYT:

**SUKERO EL LIGNO.**

Jurnalaj sciigoj pri sukcesa fabrikado de sukero el ligno vekis grandan miron ĉe publiko; ĉe kemiistoj estis la miro malpli granda, ĉar principo kaj ebleco de tiu reakcio estas jam de longe konataj.

La ligno konsistas el proksimume 50% da celulozo kaj 50% da inkrustaj substancoj en kiuj la plej multa estas lignino. La inkrustaj substancoj estas solveblaj en varmegaj solvaĵoj de natriohidroksido aŭ de kalciobisulfito, dum celulozo estas en tiuj solvaĵoj nesolvebla. Per tiu reakcio oni fabrikas celulozon el ligno por industria uzo ekz. por fabrikado de papero. La celulozo apartenas en grandan grupon de organikaj substancoj nomatan karbonhidratoj. Tio estas substancoj konsistantaj el atomoj de karbono, hidrogeno kaj oksigeno, kunigitaj en molekulojn relative komplikajn. Celulozo apartenas en karbonhidratan subgrupon polisakaridoj; tiuj substancoj havas tiom grandan molekulon, ke ĝis nun oni ne sukcesis determini ĝian grandecon. Polisakaridoj la plej oftaj en la naturo estas celulozo kaj amelo. Polisakaridoj per diversaj reagiloj estas malkomponataj en simplajn karbonhidratojn nomatajn fakulemonosakaridoj, komunalingve sukeroj. La ordinara sukero estas kemie nomata sakarozo; ĝi per efiko de diluitaj acidoj malkomponiĝas en du simplajn sukerojn (monosakaridojn) glukozon kaj fruktozon, kiuj estas en la naturo ankaŭ sufiĉe oftaj estante entenataj de preskaŭ ĉiuj dolĉaj sukroj en floroj kaj fruktoj vegetalaj, ekz. en vinberoj, pomoj, piroj k. a. La celulozo malkomponiĝas en grandan nombron da molekuloj de glukozo.

Tion la unuan fojon konstatis H. Braconnot, kiu trovis en j. 1819, ke celulozo solviĝas en koncentrita sulfata acido, kaj ke ĝi en tiu solvaĵo post ioma tempo transformiĝas en sukeron (glukozon). Pli poste li trovis, ke sammaniere malkomponiĝas la ligno. Li intencis apliki sian eltrovon praktike, sed sen rezultato. Tiu ĉi metodo malkomponi lignon aŭ celulozon restis sen-

ŝanĝa ĝis j. 1855, kiam G. H. Melsen ekuzis sulfatan acidon diluitan kaj laboris sub altaj premo kaj temperaturo. Daŭris poste pli ol duonon da jarcento ĝis oni venis al metodoj uzeblaj po-grande almenaŭ kun ioma espero pri praktika sukceso.

En jaro 1913 Willstätte kaj Zechmeister esploris, ke la ligno plej bone solviĝas en la plej koncentrita (40—41%) salacido (klorhidrogena). Ankoraŭ pli koncentritajn solvaĵojn de celulozo ricevis O. Hagglund dum la mondmilito. Sed la plej grandan progreson faris F. Bergius, granda germana eltrovanto tre fama pro siaj kaj de siaj kunlaborantoj sukcesoj por ricevi benzinon el la karbo. Ĉefa malfacilaĵo por ekonomie ricevi la sukeron el la celulozo respektive el la ligno estis en tio, ke oni malfacile povas ricevi la acidon, kiun oni uzis por malkompono. Ĝia prezo estas unu el ĉefaj elspezoj, sed se oni ricevas ĝin el la malkompona reakcio diluitan, estas tre multekoste koncentrigi ĝin denove en bezonatan gradon. Bergius uzis tute novan metodon por distilado; li varmigis la rezultintan sukeran solvaĵon en la distilujo per nebuligita oleo; la oleo nek miksas nek solvas sin en la acido. Tial la acido restas tre koncentrita. Sukeron oni disigas de la oleo per centrifugo.

La ricevita sukero ne estas glukozo, sed tetrozo; tio estas por uzo nutriĝa sen diferenco. Laŭ koncentriteco ĝi estas aŭ bruna siropo aŭ bruna kristalita substanco.

Laŭ Bergius oni ricevas, laŭ lia fabrikmannerio, el la malkomponata ligno 60—70% da karbonhidratoj. Forfalas ĉirkaŭ 30% da lignino, kiun oni briketigas kaj uzas kiel bruligaĵon; ĝia kaloria valoro estas 5000 kalorioj, proksimume tiom, kiom ĉe bruna karbo. Oni povas uzi por sukeringo lignon de ĉiu speco sen influo je rezultato, de ankaŭ lignon forfalajan. La ligno devas esti dispecigita kaj sekigita. Bergius elprovis sian metodon po-grande en fabrikejo en Rheinau-Mannheim kaj rigardas la rezultatojn bonaj. Nun oni konstruas grandan fabrikejon en Stettin.

Laŭ kemi-teknika flanko oni povas diri, ke la problemo sukeringi la lignon estas solvita. Laŭ ekonomia vidmaniero

oni devas atendi la spertojn farotajn. Ne temas pri fabrikado de sukero por nutrado homa, sed por nutrado de bestoj, precipe de porkoj. La sukero el ligno povus esti tiom malmultekosta, ke ĝi ebligus bredi porkojn en grado multe pli granda, el kio rezultus rimarkinda malaltiĝo de prezoj de porka viando. Por fabriki el la ligna sukero bestan nutraĵon oni miksas ĝin kun sekigitaĵoj terpomeroj aŭ kun soja-faruno. Tiel oni aldonas al la karbonhidrato bezonan kvanton da proteinoj kaj ricevas unuakvalitan bestan nutraĵon.

La fabrikado de sukero el la ligno ne faros miraklojn sur la tero. Sed ĝi korektos la esperojn de la eltrovintoj, kaŭzi, ke prezoj de viando falos sur nivelon, el kiu la malriĉulo povos pli ofte preni ol nun.

V KURSECH nejlepších výsledků do-  
cílíte, zavedete-li knihu

## UČEBNICE ESPERANTA

od prof. Dra A. ŠILHY, lektora esperanta.

*Schválena ministerstvem školství.*

Cena Kč 10.60 vyplaceně.

Umožňuje hovor se žáky v espe-  
rantu již od první hodiny.

Učí mluvnici praxí.

Hojnost příkladů a cvičení.

Slovníček.

Levná. — Slevy již při odběru  
5 výtisků.

94 strany.

Učitelé kursů, dopište si o bližší podmínky  
odběrní (slevy, placení atd.)

Dodá

LA PROGRESO PRAHA VII.

Sochařská, 333.

## ANIAJ AVENTUROJ.

Aŭgusto 1929.

Forlasante Vysoké nad Jizerou ni malsupreniras en la direkto al Jablonec nad Jizerou. Antaŭ unu el la lastaj dometoj sidas du sinjoroj. Unu atentigas la duan pri la esperantaj flagetoj sur la bastonoj de niaj infanoj kaj la dua tuj alparolas nin: „Ĉu vi estas esperantistoj?“ Ni ĝoje jesas kaj haltas por momento. Ĝoja, vigla interparolo. La ĝojigita maljunulo turnas sin al la dometo vokante: „Mutter, komm' her, ted' jsem našel lidi!“ Venas maljuna sinjorino kaj ĝojas, ĉar ŝia edzo ĝojas. La dua sinjoro, gasto, mirigita aŭskultas la unuan fojon al esperantlingva konversacio kun vera intereso. Nia nova konato, s-ro Stříbrný, iam forĝisto, nun posedanto de malgranda komerca butiketo, konstatas, ke ni estas la unuaj esperantistoj, kun kiuj li parolas. Eble pasis jam multaj, sed oni ne povis ilin ekkoni. Se niaj infanoj ne estus havintaj la esperantajn flagetojn, li ankaŭ estus nin lasinta preferiri sen alparolo. Li tre ĝojas povante provi sian scipovon de esperanto kaj plena de ĝojo li alportas sian solan libron „Lingvo Internacia“ jarkolekto 1901, redaktita de Paul de Lengyel en Hungario. La enhavon li scias preskaŭ parkere. Li deklamas, laŭtleĝas, deviga nin demeti la dorsosakojn, mia edzino devas laŭtleĝi kaj nia babilado fariĝas pli longa ol ni supozis. Mi uzas la okazon kaj fotografas la grupon por eternigi tiun vere maloftan aventuron. Lia esperanta pensmaniero impresas min multe. Li havas nur unu solan libron, tiun el 1901 kaj li vivas en siaj pensoj inter la kunlaborantoj de „Lingvo Internacia“ en tiu jaro, personoj, kiuj por mi apartenas jam al la historio. Li travivas la okazintaĵojn esperantistajn de tiu jaro, sekvas la polemikojn, kiujn mi nebone komprenas, dume mi, rakontante al li pri la nuna stato de nia movado, havas pozicion tre malfacilan, ĉar por li la nomoj de la nunaj agantoj estas tute fremdaj. Kiel amikoj ni adiaŭis por daŭrigi nian migradon...

Veninte al Rokytnice ni ĝojis revidi s-ron Johann Schier, UEA-delegiton, kiu laŭ nia invito vizitis nin en nia hotelo. Ni promesis viziti lin la matenon, kiam ni estos formarsantaj de lia loko. Ni tiam venis al lia domo, frapetis sur lia pordo, li aperis pala, ne dorminta, sciigante, ke ĵus antaŭ duonhoron naskiĝis fileto. Ni estis la unuaj gratulantoj....

Kaj ni marŝis supren de Rokytnice por atingi

la supron de Lysá hora kaj de Kotel atingante jam la veran reĝnon de Krakonoš. Bonodora aero de la montara arbaro plenigas niajn pulmojn. Plezuro plenigas niajn korojn. Jen limo de la arbaro, montara herbejo aperas antaŭ niaj okuloj nekruite leviĝante al Dvorská bouda. Ni haltas por ĝui la belan vidaĵon, ripozante por momento. Alproksimiĝas tagmezo, la suno brilas, ĝiaj radioj sanige banas nin. Ni ekmarŝu por atingi Kotel. La montara liberiga scenario trogajigas niajn infanojn, kiuj suprenlevante siajn bastonojn, sur kiuj flirtas la verdaj flagetoj en malforta venteto, ekmarŝas la unuaj laŭ direkto al ili montrita...

Jen proksime al la vojo, sur herbejo ripozas familio: patro, patrino, filino kaj filo. Ni rimarkas ke ili ridas kaj ni volas admoni la infanojn, ke ili ne tiom bruu... „Ĉu vi ne estas familio Sklenčka?“ aŭdiĝas amika voĉo. Ni jesas kaj kun vera plezuro premas la manojn al familio de instruisto Adam el Horní Krč. Li estas malnova esperantisto, UEA-ano, kun kiu sole unufoje mi parolis dum la konferenco „Paco per lernejo“ en Praha. Li vidis la flagetojn kaj li ekmemoris pri tiama nia renkontiĝo kaj alparolis nin. Ni haltas, demetas la dorsosakojn kaj ĉiuj ĝojas pro la bona hazardo. Mia aparato eternigas denove tiun-ĉi renkontiĝon agrablan...

Multajn tagojn ni vagis supren kaj malsupren, ni vizitis jam la konatajn lokojn, ĝojis pro la belaj suntagoj kaj sidis en budaj ĉambroj senespere, se nuboj kovris ĉion. Pli rapide ol ni deziris alproksimiĝis la tago, kiam ni devis adiaŭdiri al la amata montaro, revenonte hejmen.

La lasta tago estis la plej hela el ĉiuj. La montara suno kvazaŭ mem volus adiaŭe brunigi nin. Dorminte en Obří bouda ni devis marŝatingi Janské Lázně kaj de tie Svoboda, de kie ni per vagonaro revenos al Hradec Králové. Marŝas kun ni familio de kolego Roudný, mia kolego el Živnobanka Praha, al kiu mi klopodas klarigi la problemon de internacia lingvo. Kiel praktika pruvo de miaj diroj okazas la lasta esperantista aventuro tute apud Výrovka. Marŝantaj ĝesinoroj rimarkas la flagojn kaj alparolas nin. Ili estas esperantistoj el Danzig kaj ĝojas renkonti samideanojn en fremda por ili lando. La nomojn mi forĝesis, la fotografiaĵo malsukcesis. Sed la renkonton ni ne forĝesos.... Skl.

**BULTENO****DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333**

NUMERO 29.

SEPTEMBRO 1930.

**ATENTU!**

La kunveno de la Sekretariaro la 17. Septembro 1930 interkonsentis, ke la oficiala adreso de ĈAE, al kiu oni sin povas turni en kiu ajn afero, restas

**Praha VII. Sochařská, 333.**

Konsiderante, ke iuj skribas al Asocio en specialaj aferoj, por kiuj Asocio kreis komisionojn aŭ nomis raportantojn, kaj ke ofte estas necesa rapida interŝanĝo de l' korespondataĵoj, ni publikigas bezonatajn adresojn, al kiuj oni samrajte povas sin turni:

**Administrado de l' Membroj, financaj aferoj:**

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (administrativa ĉlenstva) Hradec Králové 628-a.

**Lernejaĵ aferoj:**

**Scienca sekcio:**

Dro Stan. Kamaryt, prezidanto de ĈAE, Bratislava, Telocvičná 3.

**Radio-aferoj:**

**Gazetara servo:**

Otto Ginz, sekretario de Ĉ. A. E., Praha—II. Stárkova, 13.

**Turismaj aferoj:**

D-ro Aug. Pitlík, Vicprez. de ĈAE, Praha—II. Křemencová, 17.

V Hradci Králové, v září 1930.

**Ĉeĥoslovenským esperantistům!**

Valnou hromadou byla mi svěřena funkce pokladníka Svazu. S pokladnou převzal jsem i všechnu péči o administrativu ĉlenstva, která až dosud zbytečně zatěžovala pražské ústředí. Pražští přátelé budou se nyní moci daleko lépe věnovati činnosti akční.

Jako jsme dovedli vybudovati v Král. Hradci československou kancelář Universala Esperanto-Asocio, kterou již po sedm let vzorně vedeme k úplné spokojenosti 1300 čl. členů UEA i ženevského ústředí, vybudujeme stejně přes-

nou i vzornou administrativu Svazu československých esperantistů. Naše obvyklá přesnost a dochvilnost odstraní všechny příčiny k jakýmkoliv výtkám v tomto směru, a bude naší upřímnou snahou uspokojiti veškeré členstvo po této stránce co nejrychleji a co nejlépe.

Přejeme si býti se členstvem Svazu ve stálém styku, a prosíme, aby nám byla věnována důvěra, kterou nezklameme nikdy.

Skutečnost, že administrativa Svazu československých esperantistů i Universala Esperanto-Asocio svěřena jest nyní podepsanému, který učiní vše, aby dobře posloužil oběma organizacím, budiž neklamným důkazem, že mezi těmito organizacemi není konkurence. Jiné úkoly má svaz národní (ĈAE) a jiné svaz mezinárodní (UEA). Obé nutno svědomitě plniti, chceme-li, aby esperantské hnutí v naší republice prospívalo.

Zvu všechny samideany dobré vůle k přátelské spolupráci, bez níž snaha jednotlivcova by byla marná.

Otto Sklenčka.

Členský příspěvek Svazu činí ročně Kč 16.-. Novému členu zasiláme legitimaci s nálepkou, členu starému jen nálepku. — Novou legitimaci starému členu vystavíme na požádání. — Každý člen má právo při zaplacení členského příspěvku zvoliti si jednu z těchto přímí:

„S“ — Svaz Náródů o Esperantu. — Zpráva o esperantu, již vypracoval pro třetí valnou schůzi Svazu Náródů jeho generální sekretariát v úpravě, jak byla přijata jeho pátou komisí 14. září 1922.

„C“ — W. E. Collinson: „Esperanto a jeho kritikové.“

„SH“ — „Sherlock Holmes en servo de la hispana trono.“

„D“ — „Internacia Konferenco „Paco per Lernejo“ Praha, 16—20 Aprilo 1927.

Píšíce nám, adresujte vždy

**Svaz československých esperantistů**

(Administrativa ĉlenstva)

**Hradec Králové — č. 628-a.**

## RAPORTO

de S-ro Hromada

prezentita en la unua membra kunveno de ĈAE  
en Praha la 30. 5. 1930.

De tempo al tempo ni legas en gazetoj esperantistaj pri krizo de la movado. Ankaŭ en nia lando, en personaj rilatoj, multaj plendis. Kion signifas tiu vorto „krizo de la movado“? Ĉu tio signifas, ke nia movado batalas por iu utopia ideo, bazita sur falsaj premisoj kaj tial nepre kondamnita al malsukceso, kiu estas antaŭmarkata per malrapida antaŭeniro? Laŭ mia ideo, pri tia krizo oni ne povas paroli. Laŭ mia vido de la aferoj, la kaŭzo de ĉio, kio ne plaĉas al mi kaj ne plaĉas al vi, estas krizo de la personoj, kaj de la sistemo labora: Mankas la personoj kaj tiuj kiuj laboras, ne ĉiuj laboras sisteme kaj racie.

Ni vidas la ĉefan signifon de la lasta jarkunveno de ĈAE en tio, ke la nove elektita komitato konsistas el personoj, kiuj havas plenan klarecon pri la situacio kaj vojoj irotaj kaj ankaŭ plene interkonsentas pri la neceseco de novaj labormetodoj.

La komitato ĝis nun kunvenis dufoje. Pri ambaŭ kunvenoj estis skribitaj detalaj protokoloj, kaj estos skribataj pri ĉiuj venontaj kunvenoj. Tiujn protokolojn ricevas ĉiu membro de la komitato — do ankaŭ la neĉeestintoj — kaj krome — ĉiuj al ni konataj grupoj ĉefaj slovakaj kaj madjaraj en ĈSR. Ankaŭ GEL, Instituto, Katolikoj, Laboristoj k. a. fakaj organizaĵoj espistaj en nia lando. Al tio ni aljuĝas gravan signifon. Ni volas esperi, ke ĉiuj ĉi personoj kaj korporacioj — regule informataj pri niaj planoj kaj laboroj, volonte kunlaboros kun ni. Minimume neniu povos riproĉi nin pro nenionfarado, sekve de tio, ke li nenion sciis.

Krome, tiu ĉi maniero ankaŭ ebligas, ke ni povos informi niajn kunlaborantojn pri aferoj, pri kiuj presita publikigo ne estas ebla. Ekzistis dum la 10 jaroj de Asocio ofte situacioj, kiuj devis resti konfidencaj por la neesperantista publiko, ofte eĉ por la esperantista mem, sed pri kiuj ni bezonis interkonsiliĝon kun bonaj amikoj de nia Asocio. Ne ĉiam ĝi estis teknike ebla.

Nun dank'al la fakto, ke Instituto pruntis sian rotacian multobligan aparaton al la Asocio kaj dank al la fakto, ke S-ro Slavík estas preta fari — kaj jam faras — la necesajn laborojn pri la pretigo kaj dissendo, ni komencas jam nun ligi viglajn rilatojn kun vasta komunumo esperantista en nia respubliko.

Ĝis fino de la jaro ni esperas havi en kelke da centoj el la urboj kaj urbejoj ĉs. „korespondantojn de ĈAE“, kiuj ludos similan rolon por ĈAE kiel la „Delegitoj“ por UEA. Ili ne nur varbos membrojn por nia Asocio, sed ankaŭ regule informos nin pri ĉiu okazaĵo iel ajn rilatanta al nia movado kaj plejparte ankaŭ kunlaboros en la Gazetara Servo. Komprenoble ili trovos ĉe ni helpon por sia loka propagando. Ĉar la provizo de la propagandiloj jam grave malgrandiĝis, la komitato devos zorgi pri eldono de nova taŭga propaganda materialo. Unu, tre taŭga, estis eldonita per zorgo de nia prezidanto D-ro Kamaryt, jam en la pasinta jaro: slovaka ŝlosilo. Tiu faras bonajn servojn en Slovakio kaj ni povus pensi pri tio, kiel en konsento kun la Instituto ni uzu la ĉefan ŝlosilon por la propagando en la landoj historiaj. Alia propagandilo ĉiam havebla ĉe Asocio estas la konata „Pojítko“: dupaĝa, laŭ alineoj dividita, de S-ro Bouška verkita: Esperanto — mezinárodní pojiťko národů“.

Alia helpo, kiun Asocio povos doni — en pli vasta nombro ol ĝis nun ĝi faris — estas konsiloj por aranĝado de kursoj, por fondado de kluboj novaj, por ĉiuspeca propagando. Neniam vi dirus, kiel ofte en plej diversaj lokoj, la homoj estas senkonsilaj kaj nepraktikaj en tiuj aferoj. Sed en Asocio estas koncentrita la sperto de la 10 jaroj kaj de la multaj personoj, kiuj rilatis kun Asocio. Kvankam ne ĉie oni povas agi laŭ la sama maniero, tamen ekzistas certaj fundamentaj principoj nepre sekvendaj, se oni volas atingi maksimumon per minimumo da penoj. Por ke Asocio estu utila en tiu ĉi direkto, nenio alia estas bezona ol ke la laboro estu dividita inter kelkaj personoj, por ke la respondado estu akurata. En la nova komitato montriĝas tiom da energio kaj emoj al la laboro, ke en

tiu ĉi direkto ni ne plu havas zorgojn.

Ĉar ni konscias, ke ni — novaj komitatanoj — nepre ne estas spertuloj sur ĉiu ajn kampo, ni iniciatis kreon de diversaj komisionoj. Ekz. D-ro Kamarýt starigas Lernejan komisionon, kiu studas ĉion, kio rilatas al esperanto en la lernejoj de ĈSR. D-ro Pitlík iniciatis kreon de komisiono por fremdula propagando kaj trafiko, kiu laborus en rilatoj kun la oficiala ŝtata komisiono tiucela. S-ro Ginz zorgos pri radioaferoj kaj esperanto kaj trovos kunlaborantojn, kiam tion postulos la laboro.

La nova komitato restariĝas ankaŭ la t. n. gazetaran servon. Tiu ĉi bone funkciis antaŭ jaroj kaj ni ĉiuj multe bedaŭris ĝian ĉesigon. Nun la afero estas reprenata, la unua cirkulero tiurilata ĵus estis dissendita. Ni kredas, ke centoj da gazetoj en la respubliko ree regule informos siajn legantojn pri la progresoj de esperanto kaj ke tiamaniere ni daŭrigos krei publikan opinion favoran al nia ideo. Ni ekzistas ja, eĉ se oni ne skribas pri ni. Sed nia pozicio estas multe pli firmigata kaj eĉ nia memfido pli kreskas, se la gazetaro, precipe la ĉiutaga, skribas pri ni. Laŭ mia opinio, pli utila por ni estus la stato kiam oni eĉ skribus kontraŭ ni, ol la stato kiam oni silentas pri ni, — kondiĉe ke ni sukcesus lerte kontraŭbatali la pli malpli saĝajn artikolojn.

S-ro Ginz, kiu gvidis la gazetaran servon jam antaŭ kelkaj kaj dum kelkaj jaroj, estas por ni garantio, ke tiu ĉi grava entrepreno troviĝas en la plej bonaj manoj gvidantaj, kaj ni ne dubas pri ĝia sukceso. S-ro Ginz mem, dum tiu ĉi kunveno, diros pliajn detalojn, same kiel D-ro Pitlík pri la ebleco troviĝanta en la kampo de uzo de nia lingvo por helpi la fremdulan trafikon kaj per tio nian movadon mem.

Kun Germana Esperanto-Ligo en ĈSR ni nun traktas pri la komuna kunsido de niaj komitatoj. Tiu ĉi kunsido, kies aranĝadon oni deziras ambaŭflanke, havas la celon: interŝanĝi opiniojn, interkonsenti pri komuna kunlaboro ĉie kie tiu ĉi estas ebla, ekz. samtempa propaganda semajno en ĉeĥaj kaj germanaj lokoj, komuna entrepreno ĉe la ministerioj, precipe ĉe la ministerio de instruado.

Grava ŝanĝo interne de la Asocio, estas tiu, ke kiel kasisto estis elektita S-ro Sklenĉka. Li mem akceptis konsentante kun ni pri la espero, ke liaj vastaj rilatoj kun UEA-membroj en nia respubliko havos influon favoran ankaŭ por la kresko de la membroj de ĈAE. Li estas preta aldoni varbilojn por nia Asocio al siaj sendaĵoj al ĉeĥaj, slovakaj kaj madjaraj UEA-anoj de ĈSR. Lia konata precizeco garantias al ni, ke niaj membroj akurate ricevos siajn membrokartojn, premiojn ktp., ĉion, kion la kasisto ĉe ni devas dissendi.

Nia klopodo en Praha, ke la kongreso de la germanaj esperantistoj en Dresden, dum pentekosto, do post unu semajno, estu vizitata de karavano de ĉeĥaj esperantistoj, ne sukcesis.

Por altiri fremdlandajn esperantistojn al Praha ni nepre bezonas iun esperantan propagandilon pri Praha. Pro tio ni ĝojas pri la saĝa decido de la Prepara Komitato de la Postkongresa Karavano Budapeŝt Praha 1929, kiu likvidis antaŭ kelkaj tagoj siajn laborojn kaj transdonis al la Asocio sumon de 2000 Kĉ por eldono de esperanta gvidfolio pri Praha. S-ro D-ro Pitlík antaŭvidas eblecon ricevi plian helpon por la eldonado de esperanto-propagandiloj turismaj flanke de la koncernaj ministerioj.

En konkorda harmonia laboro la nova komitato volas gvidi la sorton de la Asocio dum 1930. Ni ne nur promesas fari, sed jam multon gravan entreprenis. Ni daŭrigos kaj ni esperas ke ni trovos helpon de ĉiu bona esperantisto ĉeĥoslovaka. Mi faras alvokon al la ĉeestantoj, kiuj ne estas ĝis nun membroj por 1930, ke ili aliĝu al ni kaj per negranda kotizo de 16 Kĉ, eĉ pagebla poparte (8 Kĉ), subtenu finance niajn laborojn. Nur en laboro organizita, sistema, solidara estas nia venko! Ni klopodu, ke la Asocio ĉeĥoslovaka daŭre tenu la honorplenan lokon, kiun ĝi havis inter la naciaj societoj de la tuta Eŭropo, eĉ de la tuta mondo.

Kun samideanaj salutoj al ĉiuj

Rud. Hromada,  
ĝen. sekretario de ĈAE.

## PROTOKOLO

pri la I. komitata kunveno de ĈAE.,  
jaŭde, la 24. IV. 1930 en restoracio  
Odborový dům.

Ĉeestas: Brambora, Ginz, Hromada,  
Dr. Pitlík, Slavík, Zemek (Rumburk).  
S-ino Herzigová kaj F-ino Tarantíková  
foriras antaŭ la kunveno pro vizito de  
itala samideano. S-ro Ŝustr senkulpi-  
gas sin estante malsana.

Malfermo je 20.50 h. Prezidis Hro-  
mada, pli poste Dr. Pitlík.

1. Akcepto de la funkcioj. Ne  
akceptas la funkcion F-inoj Ŝupichová  
kaj Ŝalbabová (pro malsano), S-ro  
Berger (ĉar li ne estas kontenta kun la  
gvidado de ĈAE, li petas forstreki lin  
el la membra nomaro). Mankas dekla-  
roj de 2 membroj de kontrola komi-  
siono (Bujárek kaj Hanzelka) kaj du  
ties vicmembroj (Holancová, Růžička).  
Ĉiuj ceteraj akceptis.

Decido: peti ree F-inon Ŝupichová ke  
ŝi akceptu, ĉar almenaŭ skriba rilato  
estos valora por ni. Pri traktado de  
la komitataj kunvenoj ŝi ricevus pro-  
tokolajn.

2. Divido de la funkcioj. Kiel  
prezidanto estis elektita Dr. Kamaryt  
jam en la ĝenerala kunveno.

Kiel vicprezidanto laŭ propono de  
S-ro Hromada estas elektita Dr. Pitlík.  
Li deklaras pretecon vigle kunlabori,  
precipe helpi en rilatoj de ĈAE kun  
ŝtataj oficoj kaj en aferoj de subven-  
cioj. Dr. Pitlík transprenas la gvidadon  
de la kunsido.

Kiel ĝen. sekretario estas proponita  
S-ro Hromada, kiu antaŭ ol akcepti  
deziras havi certecon, ke la I. kaj II.  
sekretarioj estos personoj, kiuj efekte  
kunlaboros kaj zorgos precipe pri  
la ĉiutaga, kuranta korespondado por  
ke ne ekzistu tiurilataj plendoj.

Debato pri I. kaj II. sekretarioj. Es-  
tas proponataj S-roj Ginz, Slavík, Ŝustr,  
Brambora, S-ino Herzigová kaj F-ino  
Tarantíková.

S-ro Brambora: ne povas esti unu el  
la sekretarioj ĉar li dum certa tempo  
vojaĝas. Li estas preta dum siaj voja-  
ĝoj vizitadi klubojn kaj informi ilin pri  
entreprenoj kaj laboro de Asocio.

S-ro Slavík: deziras resti formale sen

funkcio, sed estas preta helpi en div.  
aferoj, ekz. multobligado kaj ekspe-  
dado.

S-ro Ginz: ne deziras akcepti iun  
funkcion, sed estas preta dediĉi sin al  
gazetara servo de Asocio. Tamen fi-  
ne li akceptas cedante la insistojn.

Post debato, kies pliaj detaloj sekvas,  
la sekretario de ĈAE konsistas jene:  
ĝen. sekretario R. Hromada, I. sekre-  
tario O. Ginz, II. sekretario A. Ta-  
rantíková (samtempe protokolisto).

Koncerne la kasistan funkcion S-ro  
Sklenčka deklaris esti preta akcepti  
tiun funkcion; li esperas ke liaj oftaj  
skribaj rilatoj kun ĉsl. esp.-istoj eb-  
ligos al li pli intensan varbadon por  
ĈAE. Danke aprobata kun konvinko, ke  
la konata precizeco de nia nova kasisto  
alte levos la krediton de ĈAE.

Dum la debato pri divido de la funk-  
cioj, S-ro Hromada prezentas la jenajn  
ideojn.

3. Cirkuleroj. Ĉiu membro de la  
komitato kaj de la kontrola komisiono  
estu regule informata pri la aferoj de  
Asocio kaj esprimu sian opinion. La  
varbadon por ĈAE multe faciligos, se  
ankaŭ ĉiuj grupoj kaj gravaj izoluloj  
estos regule informataj pri la laboroj  
kaj stato de ĈAE. Tiu informado okazu  
per dissendataj cirkuleroj, laŭ la mo-  
delo de la I. C. K. al la Naciaj Societoj.

4. Korespondantoj de ĈAE. La  
komitato kreu reton da personoj tra la  
tuta respubliko, kiuj estos en kontakto  
kun la komitato, estos mem anoj de  
ĈAE, varbos por ĈAE, informos la ko-  
mitaton pri ĉiuj es-paj okazaĵoj de sia  
loko kaj ties ĉirkaŭaĵo kaj reciproke  
ricevos de la komitato informojn ne-  
cesajn kaj ĉiun eblan helpon (infor-  
miloj, varbiloj, propagandiloj ktp). Ili  
povos ankaŭ kunlabori en la gazetara  
servo. Tia sistemo „důvěrníci“ bone  
pruviĝis jam en la antaŭmilita Bohema  
Asocio Esp-ista.

5. Pli oftaj kunvenoj de la ko-  
mitato. Kunvenoj de Sekretari-  
aro. Estas rekomendinde, ke la ko-  
mitato kunvenadu pli ofte, ke ankoraŭ  
pli ofte okazu kunvenoj de ĝen. se-  
kretario kun ambaŭ sekretarioj. Tio e-  
bligos, ke ĉiu afero povos esti traktata  
detale kaj ke estos pli ol unu plene in-  
formita persono en la komitato. Tio



havos sian signifon ekz. ĉe la delego de ĈAE-reprezentanto al diversaj regionaj kunvenoj.

6. Fakaj komisionoj. Por helpi sian laboron, precipe en la sferoj por kiuj la komitato ne havas fakulon inter si, la komitato kreu fakajn komisionojn el ĈAE-anoj. Kiel unua estas antaŭvidata la Lerneja komisiono, konsistanta el instruistoj de popolaj, burĝaj, duagradaj kaj fakaj lernejoj.

Ci tiuj ideoj estas ĝenerale aprobitaj de la ĉeestantoj.

Dr. Pitlík deklaras esti preta prunti la multobligan rotacian aparaton de Instituto, por bezonoj de Asocio. Danke akceptata.

S-ro Brambora pledas, ke Progreso informu pri laboroj de germanaj espistoj en ĈSR (GEL) kaj reciproke Marto informu siajn legantojn pri laboroj de ĈAE. — Arangota.

Dr. Pitlík deziras, ke la komitatoj ebligu komencon de la kunvenoj precize je la 20. horo. — Akceptita.

S-ro Hromada proponas kunvenadi en kafejo „Union“ (angulo de Národní třída kaj Perštýn). Akceptita.

Dr. Pitlík proponas neokazigi la kunvenojn sabate, escepte se S-ro Sklenčka povos tian sabaton ĉeesti kunvenon. Akceptita estis merkredo kiel kutima tago kun ĵus dirita escepto.

7. Kunveno de la komitatoj de ĈAE kaj GEL. Laŭ propono de GEL decidite, ke la ĝen. sekr. traktu kun GEL pri tago de la kunveno. Loko preferata de ni estas Praha. Por la tagordo ni proponas: Lerneja reformo kaj esp-o. Propaganda semajno. Lokonomoj.

8. Kongreso en Dresden. La kunveno konsentas ke Progreso almetu al la venonta n-ro aliĝilojn de tiu ĉi kongreso kun alvoko, ke estas dezirinde subtenadi personajn rilatojn de ĉs. samideanoj kun samideanoj de la najbaraj ŝtatoj.

9. Revizio de la kontoj 1929. S-ro Votrubec estas petata fari revizion de tiuj kontoj, ĉar ili estis reviziitaj sole de unu membro de la pasintjara kontrola komisiono.

10. Kunveno de ĈAE-anoj de Praha. Laŭ rekomendo de la ĝen.

kunveno tia kunveno kun celo informa kaj debata estas projektata por vendredo, la 30. Majo. — E. K. Praha estas petata cedi al ni tiun vesperon. Dr. Pitlík promesas riĉigi la programon per gramofondiska kurso de Dr. Privat.

Fino je 22.30 horo.

Dr. A. Pitlík mp. Tarantíková A. mp.  
vicprezidanto. II. sekr.

---

Plaťte vždy jen složenkou Svazu na jeho účet č. 9602. u Poštovního úřadu šekového v Praze. Na složenku poznamenejte, nač peníze poukazujete. — Nemáte-li složenky, napište nám o ni, nebo si kupte u svého poštovního úřadu (za 5 hal.) složenku bez čísla a vepište do ní: Svaz československých esperantistů, Praha VII., číslo účtu 9602 Praha.

---

## PROTOKOLO

pri la 2-a komitata kunveno de ĈAE, okazinta sabate la 10. 5. 1930 en Praha, kafejo Union.

Ĉeestas ĝesroj: Brambora, Ginz, Herzigová, Hromada, Janda (Kolín), dro Pitlík, Sklenčka, Slavík, Šustr, Tarantíková. Senkulpiĝitaj sroj Votrubec kaj Zemek. Gastoj: S-inoj Dolanská, Hromadová, Sklenčková, kaj S-ro Jaffe el Michigan.

Komenco: 19. horo.

D-ro Pitlík bonvenigas la gastojn kaj esprimas sian specialan ĝojon pri tio, ke sro Sklenčka konsentis akcepti la kasistan funkcion. Tiel estos ebligita daŭra kontakto inter UEA kaj ĈAE.

1. Protokolo de la pasinta kunveno estas legata sole koncize, ĉar ĝian kopion ricevis jam ĉiuj komitatoj. Oni parolas pri ĝiaj partoj, kiuj bezonas ankoraŭ prilakton.

2. Konsisto de la komitato. F-ino Šupichová denove, pro sia malsano, rifuzis akcepti membrecon en la komitato. Si tamen estas preta laŭ ebleco subteni la laborojn. Komitatano estas elektita sro Slavík, kiu akceptas tiun funkcion. Oni demandas skribe la tri vickomitatojn, kiuj ĝis nun ne deklaris sian pretecon akcepti la funkcion.

3. Kunveno de la sekretario ne povis okazi pro malsano de fino Tarantíková.

4. Kasista kartoteko. Sro Sklenčka aranĝos membran kartotekon por sia laboro laŭ prezentita modelo. Aprobata mendo de la necesa kvanto da slipoj. Prezo Kč 110.— po 1000 ekz.

5. Revizio de la kontlibroj. Sro Slavík sciigas, ke sro Votrubeč volas fari tiun revizion lunde la 12-an de majo. La reviziitajn librojn sro Slavík sendos tuj al sro Sklenčka.

6. Novaj aranĝoj en kaso. La poŝtĉekaj konteltiroj estos sendataj al kasisto sro Sklenčka. Rajton de la subskribo ĉe la poŝtĉeka oficejo laŭ propono de sro Sklenčka ricevos sroj Hromada, D-ro Pitlík kaj Slavík; subskribos ĉiam du el ili komune. La subskribrajto de sroj Eiselt kaj Novák estos nuligita. Mono ĉe Městská spořitelna de Praha estos de tie prenita kaj transdonita al sro Sklenčka, kiu ĝin deponos ĉe la Záložna peněžního úřadnictva en Praha, paganta pli altan procentaĵon. La deponlibreto de Záložna estos ĉe sro Sklenčka.

7. Danko al la eksprezidanto sro Eiselt por la multjara tenado de la funkcio estos esprimita laŭ propono de sro Kamaryt.

8. Multobligan maŝinon, apartenantan al la Ĉeĥoslovaka Instituto Esperanta tiu ĉi pruntedonos por uzo de asocio. ĈAE donos skriban garantian kaj la maŝino estos transportita en la loĝejon de sro Slavík, kiu laboros per ĝi.

9. Membra kunveno de ĈAE en Praha okazos vendrede 30-an de majo en la kunvenejo de la Esp-ista klubo, kiu disponigas tiun vesperon. Sro Dro Pitlík deklaras sin preta prezenti tie la lingvafonajn diskojn esperantajn. La ĉefa programo estos raporto de la ĝenerala sekretario kaj debato pri la temoj fuŝataj de la membroj. Sro Ginz deziras tie raporti pri la gazetara fako de ĈAE. ĈAE dissendos invitilojn ankaŭ al ne-membroj, kies adresojn liveros la klubo.

9a. Komuna kunveno kun Germana Esperanto-Ligo. GEL ne respondis ankoraŭ. Estis proponata Praha aŭ Hradec Králové por la kunveno, preferata Praha. Tago 25-a de majo aŭ

1-a de junio. Ĝenerala sekretario fintraktos pri loko kaj dato. La kunveno traktos ĉefe pri lerneja reformo, propaganda semajno, lokonomoj en la UEA-Jarlibro, Zamenhofa trezoro laŭ propono de Ing. Schneider en Karlovy Vary. Por trakto pri la gravaj problemoj de la lerneja reformo estas urĝe necesa la partopreno de sro dro Kamaryt kaj laŭ ebleco ankaŭ de fino Šupichová.

10. Fakaj komisionoj:

a) Sro Sklenčka atentigas, ke unu el la taskoj de la Lerneja komisiono estos zorgi, ke esperanto estu deklarita kiel unu el la fremdlingvoj por la matur-ekzamenoj en la Komercaj akademioj. Multaj lernantoj tiam lernos espon, ĉar ili havos facilan temon por la ekzameno. Sro Sklenčka parolas ankaŭ pri la eksterlanda ekskurso de Komerca akademio Bratislava, kiu estis multe faciligita per esperanto kaj pri kiu raportis la aranĝinto sro prof. Jukl en la Jarlibro de la akademio. La Lerneja komisiono atentigu la profesorojn pri tiu fakto.

b) Sro Dro Pitlík parolas pri la neceso starigi komisionon por fremdula propagando, kiu laboros por celoj similaj kiel la ŝtata Konsilantaro fremdula. Pri trakton de tiu afero oni reprenos post la interveno ĉe la nomita Konsilantaro.

c) Aprobata estis starigo de Komisiono por radio. Ĝin gvidas sro Ginz, kiu trovos kunlaborantojn, kiam tion postulos la laboro.

10a. Konsilantaro fremdula. Parolante pri la fremdula komisiono Dro Pitlík atentigas, ke estus rekomendinda la membreco de ĈAE en la ŝtata Konsilantaro fremdula. La komitato konsentas pri la utilo de tia membreco kaj sro D-ro Pitlík estas komisiita trakti pri tio en la koncernaj lokoj.

11. Antaŭkongresa vizito al Ĉeĥoslovakujo 1931. Sro Hromada interparolis dum Pasko en Genevo kun BEA-sekretario sro Goldsmith pri aranĝo de brita karavano al venontjara kongreso en Kraków tra Praha. Laŭ propono de D-ro Pitlík ĈAE petu por tiucela propagando monsubtenon de la ministerio por komerco. Tiu afero ne estis fintraktita.

12. Postkongresa komitato Praha 1929. En la lasta kunveno de la Postkongresa komitato okazonta la 15-an de majo la reprezentantoj de ĈAE konsentis tie, ke la ŝtatan subvencion ricevu la Esperantista klubo en Praha, al kiu estos tiel repaĝitaj ĝiaj grandaj elspezoj. La urba subvencio kiu estis destinita por eldono de gvidfolio tra Praha Kĉ 2000.- estos transdonita al ĈAE, kiu zorgos pri eldono de tiu gvidfolio. Sroj Hromada kaj Sklenĉka raportas pri la informoj venintaj el Brno, laŭ kiuj sekve de la miskomprenoj inter sro Bloch kaj E. klubo en Brno, membroj de tiu ĉi klubo anoncis sian ekziĝon el ĈAE. La ĉeestantaj membroj de la Postkongresa komitato sro Sustr kaj fino Tarantíková klarigas la situacion. La Postkongresa komitato estos petita per siaj ĉeestantaj membroj, ke ĝi klarigu al ĈAE okazintaĵojn, kiujn riproĉas la espistoj en Brno. Preciza informo pri tiuj okazintaĵoj estos petita de sro Vondroušek en Brno.

13. Germana kongreso en Dresden. ĈAE sendos salutan leteron. Karavano ne estos aranĝita, ĉar ne venis aliĝoj.

14. Korespondantoj. Sro Sklenĉka demandas, ĉu la komitato konsentas, ke la funkcio de la Korespondantoj Asociaj estu proponita unuavice al UEA-Delegitoj. Sro dro Pitlík salutas la ideon kaj la kunveno ĝin akceptas kun danko. S-ro Hromada esprimas la esperon, ke en okazo de sukceso ĝi estos organizo modela ankaŭ por aliaj landoj.

15. Novorganizo de la movado. Estas prezentata propono de sro Vogt, Stuttgart. Oni priraktos ĝin en venonta komitata kunveno.

16. Zamenhof-strato en Bratislava. Sro dro Kamaryt informas, ke li dankis en nomo de ĈAE al urbestro Bratislava, ke ĝi donis al unu el tieaj stratoj la nomon de Zamenhof.

17. Vojaĝelspezoj. Sro dro Kamaryt sciigas, ke la malaltigitaj, al li repaĝotaj elspezoj de lia vojaĝo al la ĝenerala kunveno en Praha estas 120 Kĉ. Kasisto pagos.

18. Rajtigitoj al Ĝenerala kunveno. Laŭ konstatita a) poŝta eraro

kaj b) malĝusta adreso alvenis post la ĝenerala kunveno 2 rajtigiloj: de sro Růžička Holešov kaj de sro Poláček Břeclav.

19. Oomoto el Kameoka petas sendi adresojn de la membroj. Neakceptita, ĉar adresaro principe ne estas prunte donata.

20. Konfidenca traktado pri propono de E. S. Přerov.

21. Sokola kongreso en Beograd. Sro Pytloun en Bakov proponas, ke ĈAE aranĝu interkonsenton pri komuna vojaĝo de espistoj vizitontaj la sokolan kongreson en Beograd. La komitato dubas, ke intencas veturi granda nombro da espistoj el nia lando kaj preferas ne komenci ian laboron tiurilatan.

22. Amika kunveno en Jiĉín. Sro Sklenĉka informas, ke laŭ invito de sro Vítek en Konecchlumí venos al Jiĉín la 13. 7. 1930 liaj 6 eksterlandaj amikoj espistaj. Sro Vítek petas, ke venu tien espistoj el ĉirkaŭaĵo por bonvenigi la gastojn kaj ĉefe por fari propagandon en la loko. Decidite aranĝi komune kun Teritoria Oficejo de UEA tiun kunvenon, inviti al ĝi laŭ adresaro de sro Sklenĉka kaj pagi duonon de la elspezoj.

23. Peto pri subteno Burgermeister. Sro Burgermeister en Praha petas monsubtenon por sia vojaĝo tra Eŭropo. Rifuzita pro principaj motivoj.

24. Masaryk-numero de la Progreso. Laŭ propono de sro dro Pitlík la speciala Masaryk-numero de la Progreso estos sendita al diversaj oficialaj lokoj, kies nomaron li liveros.

25. Gazetara fako. S-ino Herzígová konsentas ordigi reĝule la gazetajn artikolojn kaj administri ilian kolekton. Ŝi ricevos la eltranĉaĵojn de post la komenco 1930. Pri ordigo de la pli malnovaj materialo estos petata sro Vítek el Konecchlumí.

Fermo 23.40 h.

Dr. A. Pitlík  
vicprez.

Tarantíková A.  
II. sekr.

**GVIDANTARO**

de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista  
por 1930.

**Komitato.****Membroj:**

- Lad. Brambora, oficisto, Praha XII.,  
Čermákova 7.  
Dr. Jos. Fousek, advokato, Přelouč.  
Jos. Friedrich, fervoj-konsilanto, Ko-  
šice, Jarná 20.  
Otto Ginz, ofic., Praha II., Stárkova 15.  
Růž. Herzigová, ofic., Praha XI.,  
Karlova 8.  
Rud. Hromada, fakestro, Praha VII.,  
Sochařská 333.  
Dr. St. Kamaryt, profesoro, Bratisla-  
va, Telocvičná 3.  
Dr. A. Pitlík, ĉefsekretario de la kom.  
min. Praha II., Křemencová 17.  
Otto Sklenčka, librotenisto, Hradec  
Král., Husovo nám. 628.  
Jul. Šupichová, fak-instr., Praha II,  
M. Štěpánská 6. (Ne akceptis.)  
Jar. Šustr, komercisto, Praha I, Dlou-  
há tř. 53.  
Anna Tarantíková, ofic., Praha II,  
Panská 10.

**Vicmembroj:**

- Jos. Janda, Kolín n. L., I-79.  
A. Grauerová, Přerov, Nábřeží Ed.  
Beneše 2038.  
Kudela A., Olomouc, Hor. Novosad-  
ská 56.  
Fr. Slavík, Praha XIX, Uralské 447.  
Jos. Vondroušek, Brno, Falkenstei-  
nerova 9.  
Jan Zemek, Rumburk 184.

**Kontrola komisiono:****Membroj:**

- Inĝ. Leop. Berger, Potštejn. (Ne ak-  
ceptis.)  
V. Bujarek, Nové Zámky, Hlavná  
pošta.  
E. Hanzelka, Lazy 6.  
JUDr. Ad. Konečný, Jaroměř.  
Ferd. Votrubec, Praha 36.

**Vicmembroj:**

- A. Holancová, ředit. školy, Vyškov.  
Fr. Růžička, profesoro, Holešov.  
And. Šalbabová, Ivančice u Brna.  
(Ne akceptis.)

**Tiskový odbor Svazu**

děkuje všem, kteří projevíli zájem o jeho čin-  
nost odpovědí na jeho první oběžník. Posílá dík  
i těm, kteří odpověděti hodlají a prosí je, aby  
neváhali děle. Před odesláním druhého oběžní-  
ku, který jest připravován, přál by si správce  
odboru zpracovati došlý bohatý materiál, v je-  
hož značné rozmnožení však ještě doufá.

Ve věcech Tiskového odboru můžete psáti  
přímo na adresu: O. Ginz, jednatel S. Č. E.,  
Praha II., Stárkova 13.

**Radio.**

Svaz se chce snažiti, aby esperanto nabylo  
v radiu posice, která mu právem přísluší a do-  
sáhne jistě svého cíle, bude-li dostatečně pod-  
porován. Zatím sbírá adresy všech esperan-  
tistů abonentů Radiojournalu a vůbec všech  
svých členů, kteří hodlají pracovati zvláště v o-  
boru radia. Korespondenci, týkající se radia  
můžete řídit přímo na jednatele O. Ginze.

**REDAKCIA.**

En komenco de la nova sezono ni alportas  
al vi novan numeron de la Bulteno. En ĝi vi  
trovos detalajn informojn pri la situacio labora  
de nia Asocio. Trastudu detale la tutan en-  
havon kaj se vi trovos ion por diri al ni,  
skribu senhezite.

Ĉion kion vi ne trovos en la nuna numero,  
vi trovos en la venonta (pri la ĝenerala kun-  
veno, kronikon de la movado, raporton pri es-  
peranto en la ĉs. gazetaro, financan raporton  
k. m. a.).

Komitata kunveno okazos verŝajne sabate la  
4. Oktobro. Ĉeestos ĝin prezidanto de ĈAE.

Red.

**K různým esperantským slavnostem, na výlety**

atd., objednejte si

**ESPERANTSKÝ ZPĚVNÍČEK****„KANTARETO“**

Sestavil J. Filip.

Cena 1 výtisku Kč 7.—, 10 výtisků za Kč 50.—  
včetně poštovného.

Zasílá: **Frant. Bühr**, Praha XVIII., Břevnov 514.

Účet pošt. úřadu šek. 209.037.

Zpěvníček obsahuje mimo písně duchovní a  
esperantské hymny zvláště mnoho našich česko-  
slovenských národních písní.

# UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO : GENÈVE, SVISLANDO

Servaro : Bibliografia Servo — Eldona Servo — Ekspozicia Servo —  
 Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo —  
 Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Re-  
 klama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada  
 Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika  
 Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 623.



## FAKTO.

Nek flatojn, nek laŭdojn ni volas tie-ĉi doni al niaj delegitoj kaj vicdelegitoj konstatante, ke ĝuste ili estas la fundamentaj ŝtonoj, sur kiuj UEA konstruas sian domon depost 1908.

Dovas esti, ke la nova generacio esperantista eĉ ne momenton perdas por iomete pripensi la situacion antaŭ ol la reto de niaj delegitoj estis kovrinta nian terglobon. La homo rapide alkutimiĝas uzadi diversajn oportunaĵojn, forgesante volonte la antaŭan, malpli oportunan staton.

Nu, vi novaj adeptoj de l'esperantismo, vi verdaj infanoj, ĉu vi iam perdas momenton, momenteto de via tempo por primediti kiel estis antaŭ ol niaj delegitoj ekfunkciis kaj kiel estus, se niaj delegitoj ĉesus funkcii? Ellerninte la internacian lingvon vi komferte ekuzis ĝin. En nia jarlibro vi trovis la mirindan ŝlosilon, per kiu vi facile malfermas pordon de ĉiu fremda lando. Vojaĝante vi sen embarasoj vizitas niajn delegitojn, sciante, ke ĉe ĉiu vi trovos fratan helpon.

La servado de niaj delegitoj evoluigis la neesperantistan esperanto-praktikon. Certe neniam antaŭe ekzistis homoj, kiuj, uzante esperanton, ne havas intereson por la esperantomovado. Kion bonan ni vidu en tiu ĉi fenomeno? Simple tion, ke nuntempe uzas esperanton ankaŭ homoj, kiuj neniam, sen eblo de pure praktika lingvo-uzado, estus lernintaj la internacian lingvon. Estas ja plej ofte neeble allogi ekz. turiston al nura lingvo-studado. Li apenaŭ — anstataŭ praktiki sian turismon — restos en sia ĉambro por studi esperanton, li apenaŭ ekskursante portos en sia poŝo esperantan legolibron por legi ĝin ie sur la montoj. Dume tre facile estas allogi tiun saman turiston al praktika uzado de esperanto por liaj turistaj celoj. Ĉu ni malĝoju, ke ni sukcesas varbi nur la uzantojn kaj ne samtempajn apostolojn de nia lingvo? Tute ne! Nia celo, celo de la esperanto-movado ja estas disvastigi la uzadon de nia lingvo.

La delegitoj kaj vicdelegitoj de UEA dev-

us esti konsciaj pri la graveco de sia rolo. „Servo al la publiko“ — jen parolturno nun tre ofte uzata por indigi diversan agadon. „Servo al la publiko esperantista“ — jen la vera senco de l'reto de niaj delegitoj kaj delegitoj. Jam la fakto, ke ili akceptis la funkciojn, estas multvalora, egale, ĉu ili havas okazon servi ofte aŭ malofte, aŭ neniam. Ĉiujare kreskas la nombro de ili, la delegita adresaro en la jarlibro fariĝas ĉiam pli kaj pli dika. Tio estas bona signo, kiu promesas multon.

En nia teritorio ni estas feliĉaj havi plej densan delegitan reton inter ĉiuj landoj de la mondo. Fremdlanda esperantisto venante Ĉeĥoslovakion trovas 434 personojn en 351 diversaj lokoj pretaj servi al li laŭ iliaj plej bonaj fortoj. Tiuj-ĉi 434 personoj apartenas al plej diversaj klasoj, profesioj kaj metioj. Viroj, virinoj, junuloj, maljunuloj. Metiistoj, oficistoj, laboristoj, studentoj, kuracistoj, pastroj, instruistoj, advokatoj — ĉiuj akceptis propravole la devon „Servi al la publiko esperantista“. Ĉu tio ne estas ĝojiga fakto? Ĉu ne estas ĝojige vidi, ke inter la 434 delegitoj kaj vicdelegitoj estas anoj de ĉiuj nacioj loĝantaj sur nia teritorio, anoj de ĉiuj religioj? Kunveno de ili ĉiuj neniam estas efektivebla, ofte trovas kontakton nur la najbaraj. Tamen en unu rondo labora ili estas kunigataj. Ili konsciu tion, ili ŝatu tion! Ili krom tio konsciu, ke — kiel ni jam diris — ĝuste ili estas la fundamentaj ŝtonoj de UEA. Tiu-ĉi scio ne konduku ilin al vanta fiereco, sed ili komprenu la respondecon, kiun ili transprenis kun siaj funkcioj. „Servi bone!“ — jen du simplaj, sed tre gravaj kaj ofte tre, tre malfacilaj vortetoj.

Ni, en kies manoj kolektiĝas dokumentoj pri la servado de niaj delegitoj, volonte atestas, ke la servado estas bona, tre ofte eĉ modela. Ni rememoru nur la pasintjaran viziton de finna instruistino f-ino Tamminen el Helsinko, kiu scipovante paroli nur finnan kaj internacian lingvojn restadis kaj vojaĝis tra nia teritorio sen iu ajn lingva malfacilaĵo. Estas

nur unu dokumento el multaj. Sur bona vojo ni marŝas, ni daŭrigu...

La plia densigado de la delegita reto nin okupas daŭre. Kaj tie-ĉi povas helpi nin ĉiu bonvola samideano. Ekzistas ankoraŭ tre multaj lokoj en Ĉeĥoslovakio, kie ne funkcias UEA-delegito, kvankam loĝas tie esperantistoj. Por 1930 ni fiksas la celon: delegitoj en 400 lokoj. Mankas ankoraŭ 50 — ni atingos la celon, se vi, karaj legantoj, helpas nin!

## LINGVO-STUDADO.

### Prefikso de l'kontrasto. de P. E. Stojan, LK.

Ĉu vi iam vidis kuriozan desegnon, iufoje represatan en popularsciencaj libroj; rigardata unufoje ĝi ŝajnas esti nur senorda reto da nigraj kaj blankaj makuloj, sed ĝi aperas kiel reliefebela homa vizaĝo, kiam oni ĝin rigardas de malproksime. Se vi tian desegnon neniam vidis, faru malan eksperimenton: prenu do grandigan vitron (lupeon) kaj tra ĝi ekzameni ian foton krude kliŝitan en ĵurnalo. Tiam vi trovos preskaŭ nerezoneblan mozaikon da grizaj makuloj.

Same konfuza aro ŝajnas esti niaj multaj vortoj kiuj komencas per mal — ...kiam vi ilin esploras, unu post unu, tra mikroskopo de via analizema penso: malgranda, maldekstra, maljuna, malfermi, ... aperas apud: granda, dekstra, juna, fermi, ... nur kiel „malaj“ kontraŭaĵoj, kiel la nigraj kaj blankaj makuloj de l'aludita desegno. Sed ni ekzameni tiajn vortojn ĉiujn samtempe, kune, el malproksimo de la spirita sintezo, kiel unu tuton, kaj tiam ni rimarkos ion alian, ian harmonian impreson, pri kiu mi volas hodiaŭ atentigi.

Estas en la Fundamento pli ol 60 tiaj „mal-aj“ vortoj. Ili meritas sintezan esploron, kiu povas havigi al ni pli ĝustan komprenon de la prefikso, definita en la Universala Vortaro tro skeme, malprecize: „montras la kontraŭon, signifas rekte kontraŭan...“ Se tiu skema difino estus ĝusta ni rajtus diri, tute laŭfundamente, maltaĝo, malsomero, malsudo, malpozitiva, malveni, ... anstataŭ: nokto, vintro, nordo, negativa, fo-

riri, ... same logike kiel ni diras: malprogreso, maldekstro, malgrandegulo, malsupro. Tio estus la maniero ankoraŭ pli senbalastigi nian vortaron, ja nur por tio Zamenhof kreis „mal-“! Sed, se „malprogreso“ kompreniĝas facile kiel „regreso“, se „malzenito“ povas senci „nadiro“, la vorto „maltaĝo“ ne povas signifi „nokto“, kiel ŝajnus unuavide. Almenaŭ se ni restas sur la bazo de la Fundamento. Por iri pluen, ni faru ekskurseton en la homan ĉiutagan filozofion, kaj poste ni reprenos la fadenon de nia rezonado.

Depost kiam ekzistas la homaro — ekzistas ankaŭ ĝia dualisma mondkompreno, t. e. la kredo ke la mondo estas konstruita sur duoblaj principoj: granda kaj malgranda, alta kaj malalta, varma kaj malvarma, ĵumo kaj mallumo, supro kaj malsupro. La bonsenco de la homoj nepre kolorigas tiujn principojn kiel jen bonajn, jen malbonajn. Metafora uzado treege vastigis tiun dualismon. Latina vorto *sinister* signifis ne nur „maldekstra“ (ĉe la *sin* o t. e. koro) ankaŭ „malfavora“. Franca *gauche* signifas ne nur „maldekstra“, ankaŭ „malperta“. Germana *hoch* sencas ne nur „alta“, ankaŭ „honorinda“. Rusa *pravij* signifas „dekstra“ kaj „prava, justa“. En ĉiuj lingvoj ni povas trovi similajn ekzemplojn de morala kaj utileca kolorigo de unue neŭtraj vortoj, kiuj prae signifis nur spacajn rilatojn. Popola „filozofio“ ne povas koncepti vortojn laŭ ilia pure logika senco, ĝi nuanĉigas ilin laŭ siaj sentoj kaj sentimentoj. Unuvorte: popola filozofio distingas en ĉiu dualisma sistemo du flankojn: home pozitivan kaj home negativan, t. e. „bonan“ kaj „malbonan“.

Konscie aŭ senkonscie (tion ni ne konas), la majstro akceptis la popolan dualismon, kiam li kreis serion da „malvortoj“. Tiu dualisma filozofio restas kaŝita, dum ni konsideras la malvortojn sen atento, aboce orditajn, kiel „memkompreneblajn“ vortojn. Sed ni sisteme arigu, objektivite konsideru ilin en la tuteco, kaj ni tuj vidos ke la fundamenta uzo de mal- aplikiĝas normale nur al „negativaj“ ideoj malsana, malbona, malfeliĉa, malriĉa, malamiko, malagrabra, malĝentila, malsaĝa. Se por Zamenhof la prefikso „mal-“ estus nur

neŭtra, pure logika signo de kontraŭo, li povus preni kiel bazon, ekzemple, la internacian radikon bas kaj diri malbasa (alta), aŭ malkurta (longa), malfarda (frua), malrara (ofta) ktp. ktp. Sed, la majstro prenis kiel bazon por „mal-a“ serio nur „bonajn“ ideojn: sana, forta, saĝa, granda, amiko, amo, vero, ... kaj la „kontraŭajn“ t. e. „negativajn“ ideojn li esprimis per la prefikso mal-. Do, ĝenerale, vi ne trovos „bonajn“ ideojn esprimatajn per „mal-“. Vi trovas ne malstulta sed „saĝa“, ne „maltima“ sed „kuraĝa“, ne malelspezi sed „ŝpari“. Iu povus rimarki ke malgranda ne enhavas en si „malbonan“ ideon, ja malgranda doloro estas pli „bona“ ol granda sufero, kaj malgranda kapitalo pli valoras ol granda ŝuldo. Al tio ni povas respondi ke la meza homo opinias normala ne doloron, sed plezuron, ne malsanon, sed sanon. Krome, malmultaj esceptoj nur pravas ĝeneralan leĝon, rimarkeblan en plimulto da kazoj. Certe, mallumo estas „bona“ por la ripozo, dormo, kaj utila por fotografo, sed por ĉiuj popoloj ĝi simbolas „malbonon“. Kaj la majstro skribis: Tra densa mallumo briletas la celo... komprenante ĝin en morala senco.

Nia rapida esploro pri mal- estus nur senfrukta vortfludado, se ĝi ne havigus al ni utilan aplikon, por pliriĉigi la vortaron aŭ ĝuste prijuĝi kunmetaĵojn kun „mal-“. Se ni akceptas por Esperanto la lingvan leĝon, ke ne ekzistas tute samsencaj (sinonimaj) vortoj reale funkciantaj en unu sama tempo kaj medio, ni povas nin demandi: kia diferenco estas inter „kuraĝa“ kaj „sentima“, „maltima“. Se kuraĝa kaj sentima estas du nuancoj de „bona“ kvalito, la vorto „maltima“ devus signifi negativan kvaliton: fikuraĝa, trokuraĝa. La kvar vortoj: plenaĝa, matura, nejuna kaj maljuna, staras kontraŭ unu „juna“, sed ilia valoro ne estas egala. Tridekjarulo povas esti „maljuna“ en tiu senco ke li perdis freŝan forton de junaĝo. Sepdekjarulo povas esti ankoraŭ vigla, forta, plensana — tiaokaze li ne estas „maljuna“, sed nur grandaĝa, aĝega. Jen, alia serio: senviva, neviva, morta, malviva. Morta korpo iam vivis. Senviva estas: roko kiu neniam vivis, aŭ metafore (bildece)

— rigardo, laboro, stilo, al kiuj mankas „viveco“. Malviva estas tio kio ne plu vivas, sed ne estas „morta, nek mortinta“, ekz. fabela revenanto, vampiro, aŭ kadavroŝajna korpo de droninto, glaciiginto, ankoraŭ revivigebla.

Antaŭ multaj jaroj S-ro Ĕvstifeev, konata lingvisto, donis kiel ekzemplon de sensenca vortformado la kunmetaĵon: malforno. Li diris ke neniam kaj neniel tiu vorto povas havi ian sencan signifon. Sed, tre simpla esploro tuj montras ke „malforno“ povas esti tre utila vorto anstataŭ la internacia „frigorifika aparato“. Efektive, la varmo estas produkto de forno. Estus tute logike diri ke malvarmo (industrie kreata) estas produkto de „malforno“. Ankaŭ etimologie tio estus pravigebla, ĉar ambaŭ radikoj varm' kaj forn' apartenas al la sama familio: vrem-verm-vern-varm-vorm-forn-furn-horn-hurn- gorn-jorn-kiun entenas centoj da hind-eŭropaj vortoj kun variaj signifoj: varma, brula, brila, ktp.

Malprave do aĝas tiu kiu arbitre limigas eblecojn de nia lingvo. Estas facile proklami iun arbitran leĝon aŭ regulon, kiu malpermesas tiun aŭ alian formon, tian aŭ alian sencon, nur pro tio ke li ne konas ilin en la tradicia lingvo. Se la lingvo obeus al tiaj malpermesoj, ĝi mortus, iĝus rigida kaj senviva. Kontraŭe, trovi leĝon kaŝitan en la fundo de la lingvo, harmonian kun ĝia spirito, tio estas havigi al la lingvo-uzantoj ilon kiu permesas jen ĝuste kompreni, jen krei seriojn da novaj kunmetaĵoj kiuj pliriĉigas la lingvon neniel ĝin ŝarĝante je balastaj radikoj, en la speco de: frigorifika, teologo, matrimonia, ktp. La sufikso mal- povas produkti mekanike milojn da novaj vortoj, sed por mezuri ilian valoron, ni bezonas klaran komprenon de la sufikso, sen kio ni aŭ forĵetus la kunmetaĵojn, kiel sensencajn kombinojn, aŭ miskomprenus ilin, imagante ke ili estas samsencaj, sinonimaj kun la jam ekzistantaj vortoj, do — senutilaj.

---



---

NI ATENDAS

VIAN ABONON

POSTMORGAŬ

---



---

## LINGVA FAKO

Na 24. a 25. text k překladu došlo nás neobvyklé množství prací. Překlad bude uveřejněn v příštím čísle.

### Oprávece jazykových poklesků v esperantu.\*)

1. La unu mi vidis, la alian ne. — Správně: La unun mi vidis, la aliaĉ ne. „La unu“ (ten jeden) ve spojení s „la alia“ (ten druhý, jiný) přijímá totiž znaky -j i -n (je zde totiž zájmenem a nikoliv číslovkou): Unuj restis, aliaj ne povis atendi (jedni zůstali, druhí nemohli čekat). La unujn mi akceptis, la aliajn mi rifuzis (ty jedny jsem přijal, ty druhé jsem odmítl). La unun mi akceptis, la alian ne. Ale: Mi renkontis unu amikon, kiun mi ne vidis jam tre longe (jako číslovka je „unu“ nezměnné, t. j. nepřijímá ani -j, ani -n.).

2. En tiu-ĉi letero mi sciigas Vin... — Správně: En tiu ĉi letero mi sciigas vin.. (v tomto dopise vám sděluji...). Slovece ĉi se nespojuje se zájmenem čárkou (divisem) a zájmeno vi se nepíše s velkým V.

3. Nia ĝardeno estas dufoje pli granda ol la via. — Správně: ...duoble pli granda... (naše zahrada je dvakrát větší vaší). Výraz „dufoje“ má význam časový: mi venis dufoje (přišel jsem dvakrát). Rozlišujte tedy: Mi manĝis dufoje“ (jedl jsem dvakrát, t. j. dvakrát za sebou) a „Mi manĝis duoble“ (jedl jsem dvojnásobně, t. j. dvakrát tolik). Podobně „duobla informo“ (dvojitá informace) jsou dvě informace najednou dané (ode dvou stran nebo od jedné), „dufoja informo“ (dvojnásobná informace (je jedna informace daná dvakrát od jedné strany). Ĉili: -obl- poukazuje na množství, míru, -foj- na časové opakování.

4. Kies la domon vi serĉas? — Správně pouze: Kies domon vi serĉas? (čí dům hledáš?). Jméno, při němž jest zájmeno kies, je vždy beze členu. — Jinak ovšem, je-li kies samostatné, nepřipojené ke jménu: Kies estas la domo, el kiu vi venas? (čí je ten dům, z něhož přicházíš?).

5. Li donis al mi pecon da la pano. — Po da není členu, tedy: Li donis al mi pecon da pano (dal mi kousek chleba).

\*) S laskavým svolením autora otiskujeme ukázkou ze Školy esperanta, kterou pro začátečníky i pokročilé sestavil a vydal H. K. Bouška.

6. Donu al mi iom panon. — Správně jediné: Donu al mi iom da pano (dej mi něco chleba, trochu, kousek). Zde koncovka -n nemůže nahrazovati předložku, stejně jako ji nemůže nahrazovati ve vazbě: „veno al la amiko“ (není dobře možno: „veno la amikon“), ač ji může (ale nemusí) nahrazovati po slovese (veni la amikon = veni al la amiko). Všimněte si rozdílu „mi sentas iom timon“ (= mi iom sentas timon) a „mi sentas iom da timo“.

7. Mi elspezis mil de frankoj kaj multajn milojn markojn. — Správně: Mi elspezis mil frankojn kaj multajn milojn da markoj. Říká se: cent frankoj, mil markoj, ale cento da frankoj a milo da markoj, t. j. slova „cent“, „mil“ jsou nezměnné číslovky základní, které se kladou bezprostředně před jméno, bez předložky (jako přídavné jméno přívlastkové), ale slova „cento“, „milo“ jsou číselná jména podstatná, s nimiž jiná jména podstatná, na nich závislá, se spojují předložkou, a sice da, ježto jde o označení množství; proto: „elspezi mil markojn“ (ne: mil de markoj) a „elspezi milojn da markoj“ (ne: milojn markojn).

### AL NIAJ LEGANTOJ!

De decembro 1929 ĝis marto 1930 ni regulas eldonadis la gazeton. Ni esperis, ke ĉiuj niaj ŝuldataj pagos al ni. Tio ne okazis. La kelkmonatan paŭzon kaj nian libertempon ni devis uzi por novaj klopodoj ĉe la ŝuldataj, ĉar la sumo kiun ni havas inter ĉs. esperantistoj estas jam terure granda. Siatempo ni pli detale informos la publikon esperantistan. Tio rilatas al ŝuldataj por 1928 kaj 1927. Tiujn, kiuj ne pagis ankoraŭ por 1930, ni insiste alvokas fari tion tuj post ricevo de ĉi tiu numero. Temas ĉe ĉiu el ili pri 20 Kč, ĉe ni pri multaj miloj da Kč. Sekve de la interkonsento kun nia presisto la regula apero de la kvin restantaj numeroj ankoraŭ antaŭ fino de la nuna jaro estas certigita. Havu do fidon ankoraŭ ĉi tiun fojon.

Al daŭra ekzisto, al regula aperado, multon ankaŭ helpus pli rapida disvendo de la lernolibro de Ŝilha, en kies provizo estas katenita granda kapitalo. Uzu tiun lernolibron en ĉiuj kursoj de la respubliko!

Ni bezonas pliajn abonantojn. Varbu ilin en via loko, en via klubo, en viaj kursoj.

Ni forlasis indikon teorianta de monato super la kapo de la titola paĝo. Post marta numero aperas do nun numero kun la dato 1. Oktobro 1930. Ne reklamaciuj do!

Kelkaj bonvolaj pesonoj proponis al ni sian helpon. Ni do firme esperas, ke ni eltenos. Ĝi estos ankaŭ en la intereso de la movado en CSR.

**Eldonanto.**

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888 VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMÁDA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.